


Ret Marut

Kundar



germana fabelo

Aŭtoro	Ret Marut
Titolo	Kundar
Tradukis	Hans-Georg & Dorothea Kaiser (Donjo & Cezar) & Frank Vohla laŭ „Khundar“ el la gazeto „La Brikofaristo“
Lingve kontrolis	Vladimir Türk
Aranĝis	Frank Vohla Hans-Georg Kaiser
Finredakto	je la 07-a de septembro en la jaro 2016

LA BRIKOFARISTO

4-a jaro 30-a de apilo 1920 Kajero 26/34

Kundar

La unua libro

Renkontoj

La Brikofaristo-eldonejo

Libro,

verkita por la germanoj.

Libro verkita en tempo de la ploroj; en tempo de la plej profunda humiligo, kiam la esperoj de la juneco kaj la afliktoj de la maljuneco estas aĉeteblaj por mono; en tempo, kiam la mensogo estas varo, kiu enspezigas la plej altan monogajnon kaj la plej grandan potencon; en tempo, kiam oni laŭrokronas la murdistojn de veraj homoj; en tempo, kiam oni ŝakras oficojn kaj honorojn kiel bonan predon al tiuj, kiuj ofertas kiel ŝanĝvaloron, malhumanecon, kruelecon, venĝavidon kaj avidon pri posedo; en tempo, kiam la parolado de honesta viro estas sufokata en homsango kaj per besteca perforto; en tempo, kiam la plej fiaj perfortoj el tiuj tagoj, kiujn supozis esperoĝojaj kaj noblaj homoj jam delonge forgesitaj kaj superitaj, denove estas instalitaj por juĝi kaj regi.

Libro ne verkita per la demando: Kiam venos la savonto en tiun ĉi landon? Sed libro verkita por la germanoj kun la certeco, ke la savonto estas survoje! Malfermigu vaste la pordegojn por enlasi lin! Pretigu viajn urbojn por lin

akcepti!

La viro Kunder ne staris en la mondo.

Kaj tion li ne sciis.

Li ne memoris, ĉu iam eble estis tempo, en kiu liaj pensoj krucis sin kun tiuj, kiuj flugas facilmove tien kaj tien inter la sataj kaj la malsataj.

Li ankaŭ ne pensadis pri sia tago.

Se li vere revis, tiukaze tio povis esti same tiel bone sia vera vivo, kiel povis estis tiu estado, kiun Suno ŝajne pli forte prilumas, kaj kiu fakte estas revo.

Burĝonoj estis ĉirkaŭe kaj floroj ĉie.

Blankaj marmoralacoj en granda foro.

Oraj kupoloj kaj altaj sveltaj turetoj kun verdaj pintoj.

Tra la ununura nemezurebla ĝardeno el flameganta pompo paŝis Kunder, la viro, kun longa rapida fuĝema rapidado.

Subite li haltis.

Kaj en profunde orobruna florkaliko li ekvidis inon.

Ŝi sidis sur alta gracila trono.

Ŝi portis veston el verda brilado. Kaj miriadoj da brilegantaj kaj trembrilaj diamantoj, en kiuj ludis Suno kun miloj da kvazaŭ ŝprucantaj lumoj, estis disŝutigitaj sur la ondantan veston.

Kaj sidis la ino sur alta gracila trono.

Ŝi glitigis siajn delikatajn ĉarmajn blankajn kaj vejnostriitajn manojn tra sia vasta hararo. La hararo flirtis, se la florkaliko mallaŭte sonoriis pro vaganta zefiro, kiu portis la spiron de la maro.

Kaj Kunder kliniĝis kaj rigardis la inon.

Kaj ŝi hororiĝis sub la konsumanta rigardo, ŝi vualis sin intense kaj firme en sian ondantan hararon kaj poste kuntiriĝis al fruktopromesa delikate formita svarmado de kronetoj kaj sceptroj de malaperintaj reĝoj.

Kaj Kunder parolis: „Kial vi postkuras min, aŭreolvestita kaj

trembrila damo?"

Kaj li aŭdis vokantan fajnan voĉeton: „Ne konduku min el mia florejo, el mia floroĝardeno en fridgetan mizeran landon; kaj atentu, ke mi volas kroni vian vivon kun ĉiam malfermitaj okuloj por la aferoj de l' mondo kaj por la vero de l' vivantoj kaj mi volas doni al vi lastan tagon, kiu estos por vi promeso!“

Kaj Kunder vokis: „Kiu tie estas? Parolu plu kaj permesu aŭdi vian dolĉan voĉon kaj mi volas pensi de nun pri nenio plu krom pri vi, aŭreolvestita damo!“

Jen Kunder turniĝis kaj estis malĝoja.

Froste kaj malseke iris la vento.

Kaj kiam Kunder levis la okulojn, jen rigardu, li staris en kota strateto. Kaj estis multe da popolo ĉirkaŭ li.

Kaj la popolo ridis kaj mokis lin.

La infanoj tiris lin je lia vesto, ili blekis kaj kriis.

La inoj havis suĉinfanojn sur siaj brakoj kaj rikanis al li kaj karesis siajn infanojn kaj diris al ili: „Mia kara infano, ke vi ne fariĝu kiel tiu tie, ĉar li estas fia ĉifonulo kaj li ŝtelas la tagojn de l' mondo kaj ne laboras kaj neniam havas ruĝan pfenigon kaj neniun panon por manĝi.“ Kaj la inoj kisis siajn infanetojn kaj lulis ilin kaj gardis ilin kontraŭ la rigardoj de la perduto.

Viroj staris apogite kontraŭ la muroj. Leĝere. Ili levis la brovojn kaj larĝigis kaj dikigis la buŝojn tiel, ke ili ekhavis grimacojn. Kaj ili ŝmacis per la lipoj, rigardis sin reciproke, gestis al Kunder kaj diris: „Hm! Hm!“

Ekdoloris io en Kunder. Estis al li, kvazaŭ en lia koro io dissaltus kaj kvazaŭ gutus sango el lia koro en lian ardantan animon.

Kaj lia animo brulis.

Trista tago plenigis la strateton.

Kaj li frostetis.

Kaj tiam li forkuris kiel ĉasata homo.

Kaj la infanoj postkriis lin: „Fi-ĉifonulo! Fi-ĉifonulo! Kiu aĉetas de ni la fi-ĉifonulon?!“

La sonoriloj profunde sonoris. Ruliĝanta obtuza tambura rulado plenigis la stratetojn.

Oni portis reĝon al la tombo.

La homoj staris sur la stratoj kaj rigardis indifere. Kelkaj el la maljunulinoj ploris. Infanoj ridis kaj petole luktis, kaj la patrinoj vokis al ili: „Silentu, ŝafidetoj, la reĝo estas morta.“

„Morta“, diris knabo. „Kio estas morta? Diru al mi, patrino, kio estas morta?“ Kaj tiam li kriĉe vokis al la infanoj: „Venu, venu al mi, ni ludu morta!“

Jen diris la patrinoj kun hastaj voĉoj: „Fine eksilentu, malgrandaj kriuloj, jen venas la reĝo!“

Multaj surgenuiĝis kaj klinis siajn kapojn teren.

Antaŭe rajdis dek du heroldoj kun longaj trumpetoj, kiujn ili apogis sur siaj genuoj. Ĉiufoje post cent paŝoj ili levis per subita movo la trumpeton al siaj lipoj kaj blovis mallongajn akrajn signalsonojn. Poste ili denove demetis la trumpetojn kaj starigis ilin per firma movo sur siajn genuojn.

Post la heroldoj piede venis la tamburistoj. Ili tamburis neinterrompitan samtaktan ruladon.

Post la rulado de la tamburoj sekvis kvar rajdistoj, ili havis je ambaŭ flankoj de la ĉevalo rondajn kuprajn timbalojn kaj tiuj donis obtuzajn sonojn, kiuj malgaje tondris intere.

Poste alvenis la knabaj lakeoj en nigraj malvaste kunŝnuritaj silkaj vestoj. Ili portis antaŭ si malhele ruĝajn velurajn kusenojn.

Kaj unu el ili portis sur sia kuseno la kronon. Tiu estis nur unusola ringo el oro kaj ĝi havis je la antaŭa rando grandan bluan pompan gemon. Kaj la homoj en la strateto, preter kiuj oni portis la kronon, diris mallaŭte antaŭ sin: „La pezan kronon li fordonis, kiam la popolo malsatis kaj li parolis, ke savi homon estas pli farite ol havi oron kaj honoron.“

Jen alvenis alia knaba lakeo, kiu portis sur sia kuseno la sceptron. Kaj ĝi estis el fraksena ligno kaj skulptis ĝin karbisto. Kaj al tiu la reĝo do parolis: „Vi estas homo, karbisto, kaj mi estas homo, bona kiel vi kaj malbona kiel vi. Kiel mi portu la signon de juĝisto en la manoj, kvankam

neniu homo surtere povas esti juĝisto kontraŭ alia homo?
Kiel mi arogu al mi la potencon eldiri verdikton por
ekzekuto per hakilo aŭ ekzekuto per ŝnuro aŭ por enkaŝigo
de homoj? Se vi havas kverelon pri viaj agroj, tiukaze mi
volas mezuri kaj taksi kaj paroli mian diron. Sed tiuj, kiuj
havas oficon en tiu ĉi lando, estas pli fortaj ol mi kaj tiuj ne
agaz tiel, ĉar ili estas plenaj de avido.“

Kaj venis alia lakeo, kiu portis sur sia velura kuseno
mirindan feran kesteton. En ĝi estis la reĝaj juveloj. Tiuj
aspektis veigaj kaj forlasitaj. Sed eĉ pli veigaj kaj eĉ pli
malĝojigaj aspektis la etaj oraj ŝuoj, kiujn la reĝo portis kiel
infano.

Kaj kvina lakeo portis sur sia kuseno grandan libron kun
arĝentaj protektogarnaĵoj kaj fermitan per malvastaj rigloj.
La lakeo kun la libro sekvis la mortan reĝon kaj oni intencis
forbruligi la libron kun li; ĉar li skribis en ĝin dum ĉiu tago
de sia vivo ĉion, kion li pensis, kion li faris kaj kion li vidis,
ĉar neniu homo eksciis, kion la reĝo skribis en solecaj horoj.
Kaj tiun libron oni nun portis kun li al la tombo. Tiel ordonis
la konsilistaro, sed ankaŭ la reĝo, sed ambaŭ tamen pro

diversaj kialoj.

Sesa portis la krudan toltukon, el kiu la reĝo ĉiujare disĵetis mem la semon por peco da tero, kiu donis al li la grajnopanon.

Sepa portis la glavon de la reĝo. Kaj la glavo je duono estis tiritita el la ingo, por ke ĉiu el la popolo vidu, ke ĝi estas rustita.

Oka kondukis per simpla ledobridilo la rajdoĉevalon de la reĝo. Ĝi hufobatis senpacience.

Naŭa per ŝnuro kondukis la hirtan plej preferatan hundon de la reĝo. Kaj en la tuta procesio estis neniu, kiu malĝojis tiom, kiom tiu malbela hundo.

Poste sekvis la reĝo.

Ok viroj portis la glatan simplan ĉerkon kaj po ok viroj iris en ĉiu vico unu apud la alia.

La ĉerko ne havis tegmenton; kaj tial la kadavro de la reĝo kuŝis malfermita por ĉiu rigardo.

Malantaŭ li iris la marŝaloj, la konsilistoj kaj mastroj. Ĉiuj en grizaj vestaĵoj kun altaj verdaj ĉapeloj kaj blankaj antaŭtukoj. Ili rigardis respektige kaj ĉiu el ili pensis ion alian, neniu pri la morta reĝo, sed certe la plej multaj pri la estonta.

Sur ambaŭ flankoj de la procesio kaj en grupo je la fino marŝis la gvardianoj vestitaj en siaj malhele bluaj kaj nigre kunŝnuritaj vestoj kaj kun surŝultraj fusiloj. Ili iris firme egalpaŝe kaj nek rigardis dekstren nek maldekstren. Se trudiĝema knabo urĝis kaj kaptis ilin je vestofinaĵo aŭ kaptis ilian mallongan bajoneton, ili diris kun grumbla retenita voĉo: „Tuj foriru, diabla bubo, mi fortranĉos vian orgojlan nazon, knabo.“ Jen la knaboj ekkriĉis kaj fuĝis.

Kaj tute malantaŭe iris Kundar. Tute sola, kiel lasta. Kun la plej malgajaj okuloj kaj kun profunde pendantaj ŝultroj. Li aŭdis flustradon el ĉiuj pordoj kaj pordegaj vojoj kaj anguloj: „Rigardu, ho, rigardu, tie iras la viro Kundar, rigardu nur, rigardu, ankaŭ li iras kun la morta reĝo al la tombo. Ĉu vi bone vidas tion?“ Kaj li aŭdis la respondon: „Ni vidas ĝin, jes ja!“

La strato krute ascendis. La krude ŝtona pavimo de la urbaj stratetoj finiĝis tie. Oni aŭdis la grincantan sablon sub la samtaktaj paŝoj. Kaj intere tra ĝi sonis de la urbeto pli kaj pli postrestanta la longe postsonantaj sonoriloj. Ili perdiĝis pli kaj pli mallaŭte en la tamburoj kaj timbaloj kaj fanfaroj.

Alte sur la monto troviĝis eta preĝejo. En ties kriptoj oni konservadis la urnojn, kiuj entenas la cindron de la reĝoj.

Sur la verda placo antaŭ la preĝejo estis surtavoligita ŝtiparo el delikate odorantaj lignoj.

Oni levis la reĝon softe kiel dormanton sur la grandan monton el lignoj. La griza hararo de la reĝo flirtis en la vento.

Jen la vila malbela hundo terure ekbojis kaj hurlis. Ĝi deŝiris sin de la ŝnuro, saltis inter la ŝtipojn de la ŝtiparo kaj oni ne plu vidis ĝin.

La lakeo, kiu ĝin gvidis, volis sekvi ĝin. Sed unu el la marŝaloj vidis tion kaj vokis ordonante: „Lakeo!“

Jen la lakeo revenis kaj oni lasis la hundon, ĉar neniu alia krome troviĝis, kiu estus farinta la saman kiel tiu hundo, kaj tamen ĉiu el la popolo diris, ke li amis la reĝon.

Jen oni aŭdis la kantadojn por la mortinto kaj la longe plendantajn vokojn laŭ lernitaj rimoj. Ili sonoris tra la lando kaj perdiĝis en la foraj sonoj de la sonoriloj.

Kundar staris tute malantaŭe.

Kiam la ligna monteto ekflamis je la unua fojo, kiam la reĝo unuan fojon moviĝis, kiam la hararo bruldifektiĝis kaj la aero estis plenigita per la delikataj odoroj de la flamantaj lignoj, jen Kundar vidis sisi maljunan viron ĉe flanko de la vojo.

Kaj Kundar iris al li kaj diris: „Amiko, kia entombigo estas tiu?“

Kaj la maljunulo diris: „Vi pravas, amiko, kia entombigo estas tiu!“

Kaj Kundar vidis kun granda ĝojo: La maljunulo havis mirigajn, profunde brilajn okulojn. Tiuj bonfartigis lin senfine kaj li ekamis la viron kaj diris al li: „Tio estas la entombigo de reĝo! Ve, tio estas morto de reĝo! Ĉu ne estas tiel, kvazaŭ kolektiĝis nur multaj komercistoj, kiuj finis negocon ĝustatempe kaj honeste kaj kun neta enspezo? Kaj neniu ploras. Kaj mi estas fremdulo ĉi tie kaj ĝi aflikta min. Ĉu la reĝo ne meritas almenaŭ unu amikon, kiu ploras pro li?“

Jen diris la maljunulo: „Ĉiam reĝo meritas amikon, sed ĉu

reĝo kiam ajn havis amikon? Ĉu iam ajn ploris amiko pri reĝo? Se ne la grumo priplendas la morton, ĉar la reĝo pagis al li per valorplena monero kaj ĉar li nun devos vagi aliloken.“

Jen diris Kunder: „Eĉ ne unu amikon, eĉ ne unu amikon en la vivo! Kaj tamen reĝo. Ankaŭ mi ne havas amikon, mi estas tute sola.“

Jen diris la maljunulo: „Tial vi do estas reĝo, kvankam vi ne portas reĝajn vestojn kaj ne loĝas en reĝaj loĝejoj.“

Jen diris Kunder: „Sed mi portas ja reĝajn vestojn kaj mi loĝas ja en reĝaj loĝejoj. Neniun amikon! Mi neniam havis amikon! Ĝoju pri tio, ho, homo!“

Jen diris la maljunulo: „Reĝo estas homo! Homo estas reĝo! Certe, homo, ĝoju do pri tio, ĉar vi ekkonas tion.“

„Sed ĉu li ne havas filon, kiu sekvos lin?“, demandis Kunder.

„Kaj se li havus iun, ĉu li ne ridus, ĉar lia patro mortis kaj li estas la heredanto? La hundo ploras pri la homo, ne la filo,

kaj ne la amiko, kaj ne la edzino.

Kaj Kunder diris: „Kiu estas do reĝo en la lando?“

Jen diris la maljunulo: „Knabineto, virgulineto, la filino de la reĝo. Ĉu vi ne konas ŝin, amiko?“

Jen diris Kunder trankvile: „Certe mi konas ŝin, ŝi estas la aŭreolvestita ino. Ĉu ne?“

Jen diris la maljunulo: „Ŝi estas kaj tamen vi estas fremdulo.“

Jen Kunder eksilentis kaj diris: „Ne, ŝi ne povas kuniri al la tombejo, ŝi havas dolorantajn piedojn.“

Jen diris la maljunulo: „Jes ja, ŝiaj piedoj sangas. Ĉiu homo, kiu serĉas, havas sangantajn piedojn pro multo da irado.“

Jen diris Kunder: „Se ŝiaj piedoj sangas, mi devus plori pro senfina doloro, kaj tamen mi volas jubili pro beateco. Ho, maljunulo, mi ne scias, kiel mi fartas.“

Jen diris la maljunulo: „Ŝiaj piedoj estas vunditaj kaj doloras

kaj sangas, sed eĉ, se ili ne sangus, ŝi tamen ne povus kuniri al la tombejo, ĉar ĝuste en tiu horo la juna reĝino naskas infaneton.“

„Tio ne povas esti“, diris Kunder mirigite. „Kiel tio povas esti? La juna reĝino ja ankoraŭ ne amoris, ĉu ne?“

Jen diris la maljunulo: „Kaj tamen tiel estas. Ŝi naskas infanon. Ĉar tiel la konsilistoj kaj mastroj ordonis ĝin: Ili diras, ke tio devas esti tiel, ĉar la bonfarto de la popolo postulas tiun ordonon.“

Jen diris Kunder: „La reĝino naskas infaneton. Kiel tio povas esti?! Kiel tio povas esti?!“

Jen diris la maljunulo: „Jes ja, fremdulo, eble dolorigas vin ankore aŭdi tion, ho, mi scias. Sed pli doloriga ol via koro doloras je tiu horo tiu de la reĝino, ĉar tion vi ne scias: 'Ŝi tranĉas la infaneton mem el sia koro.'“

„Ĉu el la koro? Ĉu el la propra koro?“ diris Kunder kun miro.

„El la propra koro. Ve, kian doloron ŝi suferas.“

„Ho, kian doloron la homo suferas, kiu ekkonas, ke li estas homo inter tiaj, kiaj ne estas homoj“, diris la maljunulo kun trankvila voĉo.

„Sed kio nun?“ demandis Kundar.

Jen diris la maljunulo: „Ne zorgu, amiko, ĉu ne ankaŭ vi estas ŝia koro? Vi estas ja mem. Vi, Kundar, vi kaj la aŭreolvestita ino. Estu vi mem! Vi estas ŝia koro!“

Subite estis senfina ĝojo en Kundar!

Kaj li rigardis supren kaj li rigardis en la brilajn okulojn de la maljunulo, kiuj bonfartigis lin. Kaj li tre miris: Ne estis okuloj, estis nemezureble profundaj kavoj, kiuj tiel vaste kaj profunde etendiĝis internen, kvazaŭ ili devus sufiĉi kun certeco trans ĉiujn marojn. Jen profunda peza tenebro, kiu troviĝis en la okulaj kavoj. Kaj la tenebro impetis kaj estis plena kaj satigita de eterneco, tiel, ke ĝi brilis grandioze al li simila al mirindaj nigraj steloj.

Kundar levis siajn okulojn kaj jen: la ligna monteto ekflamegis antaŭ la ĉielo kaj la reĝo rektiĝis, leviĝis alte en

la flamoj, turnis flanken kaj falis.

Kaj kiam tio okazis, Kunder rigardis ĉirkaŭ si kaj jen: Ne estis homo tie, la granda stranga kunstarantaro estis haste disirinta.

Li volis demandi la maljunulon. Sed ankaŭ la maljunulon li ne trovis plu.

Kaj kiom ajn longe liaj okuloj rigardis, li ne vidis foriri aŭ veni iun.

Granda pramalnova ŝtono kuŝis je lia flanko.

La maljunulo sidis sur ĝi.

Kaj Kunder sidigis sin sur la ŝtonon, rigardis malsupren en la vastan pejzaĝon kaj vidis malproksime lumi ĉarman urbon en la subiranta Suno.

Suno flamegis kun kvazaŭ ŝprucantaj flamoj.

Grizaj krepuskaj vualoj vagadis trans la nebule tremantajn kampojn, kaj profunde bluaj brilantaj longaj vicoj de altaj

poploj tranĉis sin en la ebenon.

Ankoraŭ nun sonoris la sonoriloj mallaŭte supren el la urbo.

Kaj Kunder diris: „Nun mi foriru por dormi. Mia domo ne estas malproksima kaj mia ripozejo estas ekipita por la nokto.“

Kaj li kuŝiĝis apud la ŝtono por dormo.

Kaj li parolis en la sonĝo kaj do diris: „Ho, kiom longa estas la tago, kaj la homo haste rapidas kaj li tamen neniam preterkuros ĝin!“

Forĝejo staris ĉe la kampara ŝoseo malproksime de la vilaĝo.

Transe ĉe la arbaro, en alta herbejo kuŝis la viro Kunder kun brakoj metitaj sub la kapon kaj genuoj suprentiritaj, li rigardis per beataj okuloj en la ridantan bluan ĉielon kaj de tempo al tempo palpebrumis transen al la vaste malfermita forĝejo, kie la forĝisto kaj siaj helpantoj anhelis ĉe la fajro kaj kun kolero traktis la kontraŭstareman feron. La fero fariĝis malica kaj ruĝa pro kolero, ĉar ĝi volis konserviĝi tia, kia ĝi estis kaj ne volis fariĝi tia, kia la forĝisto ĝin celis havi. Kaj ĉiujn ĉi multajn blankarde lumantajn steletojn kolektitajn dum multaj miloj da jaroj de la fero, tiu nun elĵetis kaj krakade ŝprucigis sur la nudajn brustojn de la forĝistoj kaj en ties okulojn tiel, ke la forĝistoj kriis: „Damnita fifero, mi ja instruos vin!“ Kaj tial ili martelis pli kaj pli kolere sur la feron.

Kaj kiam Kunder jam certan tempon palpebrume rigardis transen al la ŝvitantaj, vaporantaj fulgokovritaj kaj streĉege laborantaj koleraĵoj viroj, denove li levis siajn okulojn supren en la ĉielon, kiu jubilis sate klare, Kunder fariĝis des pli

elkore ĝoja trans ĉiujn sensojn pri la pura, blue volbigita
alta vasto, kiu ampleksis la tutan universon.

„Mondo mia! Mondo mia! Kaj mi estas ties filo kaj ties homo
kaj ties reĝo“, ĝi jubilis en lia animo.

Kaj kiam li estis tiel ĝoja kaj ĉio ĉirkaŭ li ŝajnis sankta,
kvazaŭ Dio promenus surtere, jen rigardu – alrajdis ino.

Falko sidis sur ŝultro de la ino, ne katenita.

Antaŭ la forĝejo ŝi haltis.

Sed neniu elvenis por priservi ŝin.

Jen Kunder alsaltis kaj diris: „Nobla damo, akceptu plej
afable mian helpon. Ĉu vi deziras tion?“

Kaj la ino parolis: „Dankon al vi, sinjoro nobla, kun ĝojo mi
akceptas vian helpeme etenditan fortan manon.“

Kaj ŝi konfide apogis sin surbrake de li. Kaj ŝi ne vidis, ke
liaj ŝuoj estis disŝiritaj kaj lia vesto sovaĝa miksaĵo el trivitaj
ŝiraĵoj.

Jen alvenis la forĝisto, purviŝadis la varmegajn manojn per siaj manikoj, demetis la ledan ĉapon kaj diris: „Je via servo!“

„Vi alvenas malfrue, majstro forĝisto! Malfrue!“ ŝi diris, „sed laboro senkulpigas ĉiam kaj ĉion, tion mi opinias, por ke mi ne ofendu vin. Rigardu mian ĉevalon, ĝi perdis hufoferon, kaj ĝiaj hufoj estas doloremaj kiel mano de knabineto. Surnajlu novan feron, majstro forĝisto.“

Jen diris la forĝisto: „Je via servo! Sed kie estas via servisto?“

Jen diris la ino: „Miaj servistoj ŝajne perdis min. Sed vi celas la pagon. Jen prenu tiun valorŝtonon.“

Kaj ŝi prenis de ora ĉeneto, portata ĉirkaŭ sia kolo, brilan belegan smeraldon.

La forĝisto rigardis la juvelon kaj diris: „Bela juvelo, efektive bela valorŝtono! Tian belan juvelon mi ne vidis dum mia tuta vivo. Efektive, bela ŝtono.“

Jen diris la ino: „Vi havu la ŝtonon, se vi hufoferas mian

ĉevalon.“

Jen diris la forĝisto: „Ne, tio kostas kvar pfenigojn da bona regna monero; kvar pfenigojn kaj ne pfenigon pli aŭ malpli. Tiel estas laŭ gilda regularo, kaj tiel estas ĉiam.“

Jen diris la ino: „Sed la ŝtono validas mil orajn guldenojn.“

Jen diris la forĝisto: „Certe. Vi ja diras, tial estas la vero. Sed mi ne povas manĝi ĝin. Mi ne povas trinki ĝin kaj mi eĉ ne povas aĉeti por mia edzino tuforubandon, ĉar la komercisto ne akceptus ĝin.“

Jen diris la ino: „Nu do, majstro forĝisto, do ĝoju pri ĝi festtage aŭ kiam ajn krome vi emos.“

Jen diris la forĝisto: „Por tio mi ne havas tempon, mi ĉiam devas labori. Kaj se la ŝtono estus el vitro, ĉu? Kio tiukaze?“

Jen diris la ino: „Kaj eĉ, se ĝi estus el vitro, ĉu ĝi ne estas bela? Ĉu vi ne vidas, kiel mil sunoj briletas en ĝi?!“

Jen diris la forĝisto: „Tiujn mi vidus pli bone en mia forĝeja fajro kaj tiukaze mi scius, kio ĝi estas. Ĉu vi ne havas kvar

pfenigojn? Tiukaze iru kun Dio, mi devas fari mian laboron.“

Kaj post kiam li diris tion, li turnis sin kaj iris al sia amboso, kie oni tuj poste povis vidi, kiel li kun siaj kunuloj forĝas per svingoplenaj duoblobatoj pezan ringon.

Jen diris la ino: „Kion ni nun faru?“

„He“, diris Kundar. „Mi volas fari al via bela besto feron tian delikatan kaj bonan, ke ĝi mole iru kaj kiel sur juna mola herbejo.“

Kaj li ŝiris grandan pecon el sia jako kaj firme kaj lerte ligis la ĉifonon ĉirkaŭ la hufon de la ĉevalo.

Kun rideto la ino observis lin.

Kiam li estis preta, li diris: „Ĉu la hufo de tiu grandioza besto el Arabio ne valoras cent- kaj milfoje pli ol mia malnova jako?! Kaj ĉu mia jako povus sperti pli grandan honoron ol protekti la piedon de tiu nobla ĉevalo?!“

„Ĉu tio estas via sola jako?“ demandis la ino.

„Se ĝi ne estus la sola, ho, kiom da zorgoj mi havus! Feliĉe ĝi estas mia ununura. Kion mi havas ĉi tie ĉe mi, kaj kion mi portas ĉi tie je mia korpo, estas mia tuta posedo, kaj tie, kie mi staras kun miaj ambaŭ piedoj, tie estas mia lando kaj mia reĝolando. Laŭdata estu Dio! Ĉu iam reĝo posedis pli?!“

Ŝi ridetis kviete kaj diris nenion.

Kaj li levis ŝin sur la ĉevalon, kaptis la ĉevalon je la bridilo kaj kondukis ĝin zorge sur la straton.

Jen la forĝisto venis el la pordo kaj vokis: „Ĉu vi vojaĝos malproksimen kun jubilo, ĉifonkunulo! Ŝtelisto de la tagoj de Dio! Sundiboĉulo! Prisorĉisto de damoj! Kuzo de l' diablo! Hehe kaj haha, kun jubilo kaj kantado kaj gloro! Tordisto de malsatŝnuro!“

Jen demandis la ino: „Kiun celas la forĝisto?!“

„Min!“ diris Kunder senzorge. „Ja kiun alian krom mi?“

Pri tio la ino elkore ekĝojis, ke li ne diris, ke li ne scias tion.

Kiam ili nun survojis, diris la ino: „Vi estas la kantisto Kunder, ĉu ne?“

Jen li diris: „Jes ja, mi estas la kantisto Kunder, tiu mi certe estas. Kaj vi estas la reĝidino, ĉu ne?“

Jen diris la ino: „Jes ja, mi estas.“ Kaj ŝi aldonis: „Sed Kunder, amiko mia, rigardu min foje! Ĉu vi do ne konas min?“

„Ja, kompreneble mi konas vin! Vi estas la aŭreolvestita damo kun la sanganta koro kaj la vunditaj piedoj. Vi estas ŝi.“

Kaj li kliniĝis malsupren al unu el ŝiaj piedoj.

Jen ŝi diris: „Ĉu vi havas kanteton por mi, Kunder?“

Kaj li respondis: „Por vi ĉiujn miajn kantojn. Mi tuj rigardos en mia kesto.“

*Alvenis birdoj kriantaj
de fora mara strand'.*

*Rajdistoj venis irantaj
tra la vasta land'.*

*Knabino venis de l' monto
malsupren do sen esper'.*

*Amat' post murd-renkonto
jam kuŝas nun en la ter'.*

*Tri ruĝaj rozoj floras,
tri hiacintoj sur ĝi.*

*Nur ardo plu enkoras.
Karul', vi mankas al mi.*

*Migras mi do, migras sen vi.
Kion mi revu? Diru al mi.*

*Pri via ore bruna silka harar'.
forpasis jam jaroj kaj jar'.*

*Ho kara, neniam mi trovos vin,
Mi mortas je l' kor' pro la mank' de anim'.*

Jen la ino fariĝis tre silentema.

Kaj kiam ili jam denove iris certan tempon, diris Kundar:
„Rigardu, reĝino, tie transe estas via urbo!“

Kaj la urbo troviĝis en la foro en sunsubiro kaj lumis kiel flama maro.

Kaj jen diris la ino: „Mi devas danki al vi dufoje, Kundar. Prenu tiun belegan safiron el Hindujo kaj la oran kolĉeneton! Ne kiel pagon, Kundar. Ja kiu sur la vasta tero kapablus pagi vin, amiko mia. Ne kiel pagon, sed prenu ambaŭ el mia mano kiel honorigon de la kantisto kaj de la plejkarulo de belaj damoj. Ĉu vi volas?“

Kaj Kundar prenis la mirinde belan valorŝtonon el Hindujo, lasis brili ĝin en la ruĝa suno, prenis la oran kolĉeneton, tenis ĝin alte sur mano antaŭ si, lasis ĝin karesige gliti tra la fingroj, metis ĝin al vango; poste li denove tenis ĝin alte antaŭ si, glitigis siajn okulojn kareseme sur ĝi kaj poste redonis ĝin al la ino kun beata vizaĝo.

Li diris: „Nun mi havas mian honorigon por ĉiam, reĝino

aŭreolvestita! Pli da honorigo mi neniam povus ricevi.“

Jen diris la ino: „Mi supozas scii, kion vi diras, Kundar, amiko mia!“

Li prenis la oran kolĉeneton kaj la mirinde belan juvelon el Hindujo kaj ĵetis ambaŭ vastarke malsupren en la riveron.

Ŝi diris: „Kundar, neniuj homoj denove tenu enmane aŭ vidu per la okuloj tion, kio vin beatigas, Kundar!“

Jen diris Kundar: „Dankon al vi, nobla damo, nun ĝi estas eterne mia!“

Kaj kiam ili denove iris dum certa tempo, diris la ino: „Aŭskultu, Kundar, mi havas malgrandan ĉarman ĉaskasteleton en la arbaro; ĝi situas belege apud lago. Mi donos ĝin al vi, kaj donos al vi krome kvin orajn guldenojn dum ĉiu lundo. Prenu ĝin de mi, Kundar.“

Kundar ne respondis.

Kaj kiam ili denove iris dum certa tempo, li diris: „Ĉu vi estus kolera, nobla damo, se mi dirus, ke ne? Prefere, mi

petas vin, ne koleru, mi prefere el mia tuta koro volus diri,
ke ne.“

„Diru laŭ via plaĉo, kiel ajn, Kundar. Sed vi farus al mi
grandan ĝojon, se vi sciigus deziron al mi.“

Jen diris Kundar: „Nu, do, se ĝojigas vin, lasu min trinki el
kristala pokalo oran vinon kaj permesu manĝi panon al mi
el pelvo de pura oro kaj permesu al mi preni fruktojn el
pelvo de majstro skulptita el ununura opalo kaj permesu al
mi ripozi dum horo sur la plej bela tapiŝo el la orientlando.“

Jen diris la damo: „Estu tiel, kaj mia ĝojo estas granda.“

Kaj kiam ŝi diris tion, brilis ŝiaj okuloj kiel du gvidaj steloj al
migranto en profunde malhela nokto.

Kaj ŝi diris: „Rigardu, jen venas miaj servistoj!“

Kaj kiam la servistoj proksimiĝis, ŝi diris al ili: „Tiu nobla
granda sinjoro kondukis min, kiam vi ne ĉeestis, tiu nobla
granda sinjoro nun kondukos min ankaŭ en mian burgon,
kie vi ĉiuj estu je dispono. For! Antaŭen! Kaj preparu mian

alvenon!“

Kaj la servistoj haste forkuris.

Kiam la ino nun venis en la burgon, ŝi diris: „Oni konduku tiun noblan kaj moŝtan sinjoron en mian loĝejon, nokte oni sonigu en la burga ĝardeno la violonojn, flutojn kaj ŝalmojn. Oni alportu la plej belan kaj plej klaran kristalpokalon kun verdeta brileto kaj oran kruĉon kun kvincentjara vino. Kaj oni alportu oran pelvon kun pano kaj dolĉaj migdaloj. Kaj oni alportu raran pelvon de majstro skulptita el ununura opalo, kaj oni alportu ĝin plenigita per la plej rafinitaj fruktoj el la landoj de la egipta maro. Kaj oni alportu tiun grandan pelvon ĉizitan el la arĝentaj defendoŝildoj de la reĝo Heimdyl. Kaj oni alportu ilin plenigitaj per bone odorantaj parfumakvoj, por ke oni verŝu ĝin sur la manojn. Kaj fine oni alportu la tapiŝon de reĝo de Asirio. Se ĉio tio estos okazinta, ekde tiu sankta momento, mi ne plu volos esti ĝenata de iu! Jen mia ordono!“

Kaj el ĉiuj ĉambroj, el ĉiuj irejoj, haloj kaj kortegoj eksonis la voko perdiĝanta en la vastan foron: „Ordono!“

Kaj la reĝidino diris kun afabla voĉo: „Iru, amiko mia, banejo estas preparita por vi el tre bongusta vino, por ke via korpo ĝoju kaj viaj membroj jubilu. Iru, oni ree

kondukos vin al mi post horo!“

Kaj ŝi etendis la dekstran manon al li!

Kaj Kunder kliniĝis kaj kisis la delikate vejnstriitan blankan manon.

Kaj kiam li revenis, vidu, jen staris tie la nigraj servoknaboj kun la pelvoj, kruĉoj kaj pokaloj.

Kaj la ino alvokis la nigrajn servoknabojn, verŝis mem la odorantan vinon en la kristalpokalon kaj donis la briletantan pokalon al li kun ĝoja gesto. Kaj ŝi transdonis al li mem la pelvon kun pano kaj migdaloj kaj dolĉaj fruktoj.

Kaj la ino iris en la alian ĉambron, kaj kiam Kunder rigardis supren, la nigraj servoknaboj jam estis glutitaj de la tenebra nenio.

Kaj Kunder alvenis en alia ĉambro. Kaj tie kuŝis la tapiŝo de la reĝo de Asirio.

Kaj tiam diris la ino: „La tapiŝo, kiun nobla reĝo plektis kaj kiun li intencis donaci al sia plej kara ino, estas nun plej

honorata en tiu ĉi horo. Ripozu sur ĝi, sinjoro Kundar, kaj lulu min per viaj plej dolĉaj kantoj en sonĝon!“

Kaj kiam Kundar levis la okulojn, vidu: jen kuŝis la ino sur sia luksa kuseno preparita por la nokto.

Jen kantis la viro Kundar la plej dolĉajn kaj plej belajn kantojn de sia vivo.

Kaj malsupre en la nokta ĝardeno ludis la violonoj kaj flutoj kaj ŝalmoj.

Kaj la ĉambro fariĝis vasta kaj vastigis sin eĉ en la steloplenan ĉielan katedralon.

Kaj pli kaj pli mallaŭte kantis Kundar.

Kaj pli fore kaj pli perdiĝeme sonis la violonoj kaj flutoj kaj ŝalmoj; kaj pli fidema kaj intima fariĝis la ĉambro.

Kaj kiam Kundar levis la okulojn, vidu: jen dormis la reĝino.

Kaj ŝi turnis sian vizaĝon al li en la dormo kaj ridetis al la viro Kundar en la sonĝo.

Jen Kunder dum longa tempo rigardis ŝin kaj faldis siajn manojn respektoplene. Poste li detiris siajn ŝuojn, ĉar la planko, sur kiu li staris, estis sankta al li.

Kaj li forŝteliĝis senvorte eksteren en la nokton kaj for trans montojn kaj valojn, trans verdajn herbejojn kaj tra malhelaj arbaroj.

Kaj li portis kronon sur sia kapo.

Kaj je la mateno poste kurante alvenis sciigistoj al la marŝalo kaj al la ceremoniestro. Kaj la marŝalo lasis voki la ĉefkuraciston, li estis tre afabla al li kaj glatmaniera kaj fleksebla kiel oleo kaj promenis kun li tra la ĝardeno. Li parolis kun li pri la vetero kaj pri la ĉasado kaj pri la stato de la semaĵoj kaj pri la ĉambristinoj, kaj diris kvazaŭ preterire: „Nu, kara ĉefkuracisto mia, kion mi ankoraŭ volis demandi, kaj kion mi volis diri, ĉu vi cetere scias, ke unu el la sinjoroj antaŭuloj de Ŝia Moŝto falis en frenezon?“

Kaj la ĉefkuracisto diris: „Ne, tion mi ne sciis.“

„Ĉu ne?“ respondis la marŝalo sufiĉe mirigite kaj vaste malfermegis la okulojn: „Vi ne sciis tion, ĉu? Hmh! Hmh! Tio estas stranga. Nu do, mi almenaŭ diris tion al vi, mi opinias, por la kazo, ke....Ĉu vi vere bone komprenas min, sinjoro ĉefkuracisto?“

Kaj la ĉefkuracisto respondis: „Mi komprenas vin tute bonege, sinjoro mia.“

Kaj la reĝino rajdis kun siaj sinjoroj kaj multaj servistoj tra la floranta lando.

Kaj kiam ili venis al loko, kiu nomiĝas Vojeblo, la ino retenis sian ĉevalon kaj vokis: „Ĉu iu el la moŝtoj bonvolu esti tiel afabla kaj doni al mi manon?!“

Tiumomente unu el la sinjoroj saltis de sia ĉevalo, kuris rapide al la reĝino kaj levis ŝin de la besto.

Kaj unu el la servistoj alkuris kaj ekkaptis la bridilojn de la besto.

Jen diris la ino: „Moŝtoj miaj, kaj vi, tre noblaj rajdistoj, kaj vi, bravaj servistoj, atendu ĉi tie, ĝis mi revenos. Ŝajnas al mi, ke mi devos foriri; vojo vokas min.“

Kaj ili iris al vasta herbejo.

Kaj unu el la sinjoroj aŭdace paŝis antaŭen kaj diris fiere ĝentile: „Ĉu unu el la noblaj sinjoroj akompanu vin, reĝino? Vi certe iros malproksimen.“

Jen diris la ino: „Certe mi iros malproksimen. Tio certe

certas. Sed neniŭ el la sinjoroj sekvu min aŭ rigardu mian vojon eĉ ne el la malproksimo.“

Jen diris la nobla sinjoro: „Sed unu el la servistoj prefere iru kun vi por porti vin, kiam vi atingos akvon, aŭ kiam viaj piedoj estos lacaj.“

Jen diris la ino: „Ne, ankaŭ neniŭ el la servistoj rigardu mian vojon, ĉar mi iros la vojon de l' homo kaj volas esti por mi kaj sola, min lacigas bruado de tempo al tempo. Fidu al mi, nobla sinjoro, kaj lasu min.“

Jen la sinjoro retropaŝis kun malgaja koro.

Kaj la ino iris sian vojon.

Kaj la sinjoroj ĉiuj kolektiĝis kaj komencis ridi kaj ŝercis kaj rakontis pri ĉasoj kaj belulinoj.

Kaj tial la servistoj firmligis la bestojn kaj alfajfis la hundojn kaj kampadis ĉe la vojo kaj komencis ludi per ĵetkuboj kaj paroli laŭtajn vortojn.

Kaj neniŭ atentis la reĝinon.

Kaj la reĝino iris trans la vastan florherbejon kaj fariĝis pli kaj pli malgranda. Kaj la floroj fariĝis pli grandaj kaj superis ŝin kaj disfaldis sin survoje centkolore.

Kaj la sinjoroj diris: „Nun ni ne plu povas vidi ŝin, la karan malgrandan mirinde belan reĝinon!“

Kaj la ino iradis ĝis ĝi venis al lago.

Kaj kiam ŝi staris ĉe la akvo kaj tuŝis per la pinto de sia ŝuo graciegan ondon, jen ŝia koro fariĝis granda kaj plena.

Kaj ŝi levis siajn okulojn kaj jen: ĉe la bordo kontraŭe sidis homo.

Kaj ŝi iris al li kaj diris: „Sinjoro Kunder, kiun vi serĉas?”

„La profundon, nobla ino, mi serĉas la profundon.”

Jen diris la ino: „Kaj ĉu vi, sinjoro Kunder, opinias trovi ĝin en la lago?”

Jen diris Kunder: „Tion mi ne opinias.”

Jen diris la ino: „Nu, en ordo, kie vi do pensas trovi la profundon?”

Jen diris Kunder: „Ho, mi ne scias. Sed mi serĉas ĝin.”

Jen diris la ino: „Kaj se vi trovos ĝin, la profundon, kio tiam estu?”

Jen diris Kunder: „Tiam mi estos morta. Kaj mia koro estos trovinta la trankvilon kaj la sopiro de mia animo estos kontentigita.“

Kaj la ino staris ĉe li kaj karesis permane lian hararon.

Sed Kunder rigardis en la akvon.

Jen diris la ino: „Pripensu, amiko mia, viaj kantoj estas en la popolo. Oni kantas viajn kantojn ĉe nuptoj kaj ĉe la morto de homoj; la infanoj kantas ilin ĉe siaj rondodancoj kaj ĉe siaj ludoj; la viroj kantas ilin, se ili estas ĝojaj, ĉe vino; la inoj kantas ilin, se ili lulas siajn bebojn en la dormon; la knaboj kantas ilin en la arbaro kaj sur la vastaj herbejoj kaj kampoj, se ili volas gajni la koron de sia knabino; la knabinoj kantas ilin, se ili plektas florkronojn kaj vagadas vespere tra la apudriveraj herbejoj; la fabelorakontistoj kantas viajn fabelojn kaj kantas viajn baladojn sur la foirplacoj kaj ricevas multe da tintantaj moneroj de la popolo, kiu aŭskultas ilin; sed vi, amiko mia, ne havas tegmenton sur via kapo kaj ne havas lokon, kie vi povus protekti vian korpon kontraŭ la aĉecoj de la vetero, vi ne

havas lokon, kie vi povus meti vian kapon kviete kaj sentimo.“

Jen diris Kunder: „Tie, kie kuŝas mi, estas mia loko, kaj kie mi staras, tie estas mia domo kaj kie mi migras, tie estas mia hejmlando.“

Jen diris la ino: „Kaj vi iradas en vestoj kiel la plej malriĉa el mia popolo kaj havas nek panon nek pfenigon aĉeti al vi kruĉeton kun vino.“

Jen Kunder turniĝis flanken, derompis anemonon, kiu kreskis sub arbo, surgenuiĝis, tenis la floron alte kaj diris: „Rigardu, nobla ino, tiu ĉarma anemono ne posedas pfenigon kaj tamen ĝi estas pli lukse vestita ol ĉiuj reĝoj de Tero. Ĝi ne volas esti io alia krom vivi kaj flori kaj ĝojigi tiun, kiu volas ĝojigi sin je ĝi. Ĉu ĝia majesta vesto ne estas ĝia animo? Kaj tiel do mia vesto estas animo mia. Se Dio surmetas al mi jakon survoje, nu, en ordo, mi prenos ĝin. Ĉu tiu anemono faras alian?“

Jen diris la ino: „Nu, do, kial vi kantas viajn plej belajn kantojn kaj demandas neniam, kiu aŭdas kaj kiu portas ilin

plu?“

Jen diris Kunder: „Ĉu vi vidas la merlon tie, nobla ino?“

Jen diris la ino: „Certe, mi vidas ĝin.“

Jen diris Kunder: „Kaj ĉu vi aŭdas kanti ĝin?“

Jen diris la ino: „Mi aŭdas ŝin kanti.“

Jen diris Kunder: „Nu, do, nobla ino, demandu la merlon, kial ĝi kantas kaj ne afliktiĝas pri tio, ĉu vi volas aŭdi ĝin, ĉu ne, ĉu vi donas manĝon al ĝi ĉu ne. La merlo al vi donu la respondon anstataŭ mi.“

Jen diris la ino: „Sinjoro Kunder, vi devus esti reĝo inter la homoj kaj porti kronon.“

Jen diris Kunder: „Kiel mi povus esti tiu, kiu mi estas kaj kiel porti tion, kion mi portas. Nomu al mi la potencon reĝon de l' tero, kiu kapablas doni al mi kronon. Ĉu vi opinias, ke vi povus trovi tian reĝon?“

Jen diris la ino: „Tian reĝon mi verŝajne ne trovus.“

Jen diris Kunder:

„Kor', mia kor', kiel sangas vi!

Psiko, psik' mia, kiel serĉas vi?

Ho, Di', se venas vi animen pro morn' al mi,

lasu min perdiĝi nun en vi!

Vasta foro, ve-kvieta loko,

ŝajnas, ke eternas la voko!

Eternsoifa homanimo!

Eternsoifa homanimo!“

Perlo falis sur la kapon de Kunder. Kaj ŝi ruliĝis malsupren en manon de li.

Kaj Kunder diris mallaŭte: „Jen briltrema diamanto ekestinta el la sangoguto de plena homa koro.“

Kaj li eksaltis, kaptis la radiojn de Suno, metis ilin en la perlon kaj vokis: „La komercistoj ja diras, ke en la trezorejo de la reĝo Sugolhari troviĝas la plej bela kaj plej rara perlo de l' mondo.“

Jen diris la ino: „Tiel diras la fremdaj komercistoj.“

Kaj Kunder vokis: „La komercistoj estas mensogantoj kaj ŝakristoj.“

Kaj la ino rigardis lin kaj ridetis kun ĝoja mieno kaj diris post certa tempo: „Sinjoro Kunder, ĉu vi volas akompani min dum parto de la vojo, mi intencas fariĝi dankkulpala al vi.“

Kaj kiam ili venis al la rando de la arbaro, diris la ino: „Tie staras miaj servistoj, ĝuste tie, kie la ĉielo kliniĝas al Tero kaj tamen mi konas neniun el ili, kiu kapablas porti min supren, ĉu en la aeran alton ĉu en la dolĉan forgeson ĉu al la vero ĉu al la profunda pureco de l' animo.“

Kaj ŝi etendis manon al Kunder. Kaj kiam ŝi foriris, Kunder postrestis trankvile apogata al arbo kaj sekvis ŝian vojon, ĝis ŝi malaperis en la koloroj de la floroj kaj li vidis ŝin nur en sia koro plu.

Kaj la reĝino venis al siaj viroj kaj diris: „Mi dankas al vi, moŝtaj sinjoroj, noblaj rajdistoj kaj bravaj servistoj, ke vi atendis min ĉi tie. Ni nun iru hejmen, ĉar baldaŭ vesperiĝas kaj fridiĝas.“

Kaj unu el la sinjoroj, estis la nobla sinjoro Sabkhete, diris: „Ŝajnis al mi, kiam mi rigardis malproksimen por ekscii, ĉu vi baldaŭ venos, nobla sinjorino, ke mizera vagabondo kaj murdema fiulo staris alte ĉe via vojo. Ni volis kuri al vi por helpi, sed vi donis la komandon, ke ni ne observu vin sur la vojo. Ĉu vi ne vidis la mizeran ulon? Aŭ, ĉu li suferigis vin?“

Jen diris la reĝino: „Ĉu mizera vagabondo? Tion diris vi! Ne, mi ne vidis tian viron kaj ankaŭ certe ne renkontis tian. Sed en la arbaro, ĉe la lago de la ĉarma anemono, tie mi renkontis reĝon. Li sidis ĉe la rando de la lago kaj serĉis ion.“

Jen diris la nobla kavaliro, tiu estis la sinjoro Wotebirge: „Ĉu li portis kronon? Ĉar tiukaze, se li ne portis kronon, li certe ne estis reĝo.“

Jen diris la ino: „Li certe ne portis kronon sur sia kapo. Sed

lia krono kuŝis antaŭ li en la akvo.“

Jen diris la nobla sinjoro, estis la sinjoro Teske de Barhin:
„Kaj tial mi opinias, nobla sinjorino, ke li serĉis tiun
kronon.“

Jen diris la ino: „Ne, tion li ne faris.“

Jen diris la nobla rajdisto, estis la sinjoro Molegark: „Li ne
serĉis sian kronon, sed tamen trovis ĝin, ĉar ĝi kuŝis ja
antaŭ li en la akvo. Kaj li prenis ĝin fine tamen kaj metis ĝin
sur sian kapon, ĉu?“

Jen diris la ino: „Ne, tion li ne faris. Li ne prenis ĝin kaj ne
metis ĝin sur sian kapon. Sed el ĉiuj mirindaj kronoj, kiujn
mi kiam ajn vidis kaj el ĉiuj tiuj mirindaj kronoj, pri kiuj iam
ajn iu parolis el vi, sinjoroj, al mi, ĝi estis la plej stranga kaj
plej grandioza kaj plej majesta krono, kiu ekzistas surtere.“

Jen diris unu el la sinjoroj: „Kaj vi diras, nobla sinjorino, ke
li ne prenis ĝin, ĉu?“

Jen diris la ino: „Ne, li ne prenis ĝin. Kaj li agis certe ĝuste,

ĉar ĝi ne estis sufiĉe valora por li. Kaj tial ĝi do ankoraŭ kuŝas en la lago de la ĉarma anemono, kaj tiu, kiu trovos ĝin, al tiu ĝi apartenu. Sed, neniuj iru tien por serĉi ĝin. Aŭ nur tiukaze, se li intencas multe suferigi min.“

Kaj la ino silentiĝis kaj la sinjoroj kaj mastroj postrestis.

Kaj unu el la sinjoroj diris: „Ĉu vi vidis tion, kiam ŝi alvenis, la kara ino, ke ŝi ploris.“

Kaj iris tra ĉiuj landoj la famo, ke en la lago de la ĉarma anemono kuŝas reĝa krono kaj ke ĝi estas la plej majesta kaj plej stranga krono el ĉiuj, kiujn oni kiam ajn vidis surtere.

Sed neniuj iris tien por serĉi la kronon.

Kaj kiam tamen aŭdaca junulo venis el fremda lando kaj ekiris por serĉi la kronon, jen li ne trovis la vojon al la lago.

Pripensante sidis la ino sur roko enmeze de la arbaro. Ŝi apogis la kapon per la manoj, kaj la longa hararo pendis ambaŭflanke de ŝi.

Senfine kaj senlime staris la sveltaj kolonoj de la katedralo antaŭ ŝiaj okuloj.

Kaj la ino diris: „Homoj venas kaj homoj foriras; ili turniĝas kaj kurbiĝas kaj ĉiuj strebas al la sunlumo; kaj ĉiu opinias, ke li estas limo kaj post li kaj malantaŭ li estas la fino. Sed jen vidu: ankaŭ tie ankoraŭ kreskas arboj kaj trunkoj kaj junaj kaj maljunaj, kaj ili petolas kaj turniĝas kaj estas tamen nur ĉiuj enmeze; videblaj nur al la plej proksimaj, divenante la pli malproksiman, nevideblaj kaj forgesitaj al la foraj. Ili ĉiuj ŝajne estas limo, ili ĉiuj ne estas limo; neniu estas komenco kaj neniu fino.“

Kaj ŝi ektimis kaj diris: „Sed kiu do donis al mi tiun diron? Kiu do plantis tiun penson en mian animon, por ke mi diru tiun diron kaj komprenigu ĝin al mia menso?“

Kaj varmega spiro iris tra ŝia koro.

Jen flugis skarabeto surmanen al ŝi kaj la ino diris: „Kien, skarabeto mia, vi flugas? Ĉu vi do rapidas al via nupto? Ĉu vi flugas do al via fianĉetino? Jen salutu do kare vian fianĉetinion kaj estu ĝojaj ĉe viaj aferoj!”

Kaj la skarabo levis siajn flugilojn kaj forflugis.

Jen diris la ino: „Aĥ, mia animo flugas trans marojn kaj landojn, kaj la membroj de mia korpo estas tiom pezaj!”

Kaj piede de la roko fontis roĵo, fluis klare kaj haste antaŭen.

Kaj la ino vidis sian bildon en la roĵo, ridetis al ĝi kaj ŝi havis la intencon kisi la ŝaŭmantajn ondojn de la roĵo.

Jen falis ŝia kroneto malsupren, ruliĝis, stumblis kaj saltetis trans la rokon kaj trans la arbustaĵon, kroĉiĝis, deŝiriĝis kaj zigzagadis plezure turnante sin pli kaj pli malsupren.

Jen ridis la ino kaj vokis malsupren: „Kroneto, kroneto mia, ĉu vi rapidas for de mi? Ĉu vi tro premis mian kapon tiel peze? Do mi dankas al vi, vi, aĝa kaj kara kroneto mia! Kaj

tamen ili kaptos min, kaj tamen mi staros meze de ĝi kaj ili
metos ŝarĝon sur min. Mi estas polveto en la vento kaj ne
reĝino por la homoj. Kaj tial do mi devos voki al vi:
„Kroneto, venu supren! Venu supren al mi!“

Jen alvenis viro, kiu iris tra la arbaro.

Kaj pere de la sonoj de lia paŝado aŭdis la ino, kiu li estas.
Kaj ŝi aŭdis lian voĉon kaj li vokis: „Atentu, mi alportas la
kroneton!“

Kaj tiu voĉo senfine bonfartigis la inon.

Sed ŝi ne sciis, kio okazis al ŝi. Sed ŝajnis al ŝi, ke tiu voĉo
prenas ĉiun maltrankvilon de ŝia koro kaj kvazaŭ ŝi portus
por tio mondon plenan de Suno en sia animo.

Ŝi rigardis malsupren, kaj jen vidu: la viro rampis kaj
grimpis kaj saltis trans rokfendojn kaj trans rompiĝantan
rulŝtonaron; ŝi vidis lin pendi en la subĉiela aero nur tenata
de sveltaj arbitoj.

Kaj ŝi ne timis pro li kaj ŝi havis nur unu penson en la koro:

povas okazi nenio al li, kaj mi amas lin. Kaj ŝiaj okuloj lumis por li kaj donis al li forton kaj sekurecon.

Sed antaŭ li ruliĝis kaj petolis la kroneto. Ĝi sidis silente kiel muso sur elstaraĵo de roko, pendis dum sufiĉe longa tempo en la sveltaj branĉoj de eta piceo kaj se la viro proksimiĝis al la kroneto, ĝi ridis plezure kaj forsaltis gaje.

Sed la viro estis optimisma, li havis multe da tempo kaj li ne lasis guti venenon en sian animon.

Li ekridis laŭte kaj vokis: „Atendu, kroneto mia, atendu nur, iam mi ja kaptos vin. Ĉu vi ne pensas? Aŭ, ĉu vi eble supozas, ke tio estas streĉa laboro kapti vin? Ĉu vi eble eĉ opinias, ke vi estas pli forta ol mi? Kaj se temas pri la aŭreolvestita ino! Por ŝi ĝi estas tamen pura volupto kaj ĝojo! Kaj miaj sangantaj manoj, ĉu ili ne estas la plej dolĉa pago? Atendu, kroneto mia, atendu nur plu!“

Kaj kiam la kroneto aŭdis tion, kiam ĝi rimarkis la ridadon kaj la ĝoja optimisma parolo atingis ĝin, kaj kiam ĝi fine ankoraŭ vidis, ke liaj drolaj saltoj kaj liaj strangaj kapricoj volas damaĝi neniun, ĝi firmkroĉiĝis al delfinio kaj lasis

plezure baraktante kapti sin.

Kaj la viro diris: „Nu, kroneto mia, ĉu eble estas tiel? Vi do opinias, ke estas pli bone ĉe ŝi kaj pli bele kaj pli delikate. Ĉu ne?”

Kaj li vokis fanfare supren kaj kun hela jubilo en la voĉo: „La kroneto, nobla sinjorino, volas denove hejmen. Ĝi venas al vi kaj kunportas min! Ĉu vi estas kontenta pri tio?”

Kaj ŝi vokis jubile malsupren: „Mi ja estas kontenta pri tio!”

Kaj li kisis la oran kroneton en la kaŝejo kaj diris: „Portu tiu saluton al ŝi kaj metu ĝin sur ŝian hararon!”

Kaj li kaŝis la kroneton sur sia flamiĝanta koro.

Kaj li venis al la ino, kaj ŝi lavis la sangon de liaj manoj kaj de la piedoj, sekigis lian sangantan vizaĝon, mankaresis softe lian kungluitan hararon kaj diris: „Metu vian kapon sur mian sinon, Kundar, amiko mia, kaj ni pensu, ke ĉio estas tiel, kiel ni deziras ĝin kaj kiel ni ĝin esperas kaj kien nia sopiro rapidas! Ĉu vi volas tion, amiko mia? Kaj ni festu

ekscitajn festojn de entuziasmo, tiel, kiel neniu surtere kiam ajn vidis kaj neniu surtere kiam ajn pensis.

Kaj ŝia robo verde silke teksita kun longaj fadenoj el oro kaj briltremanta en miloj kaj miloj da steletoj kaj diamantoj pendis profunde malsupren ĝis trans la piedoj. Kaj neniu vidis ŝiajn orajn ŝuojn kun la fajnaj broditaj silkoj. Kaj kun perloj kaj briltremaj valorŝtonoj. Sed ŝia svelta korpo kun pompo kaj brila majesto estis pura kaj vera kaj spite animanta kiel la steloj de la ĉielo en ŝtaleca vintronokto.

Kaj la vesto de la viro Kunder, pri kiu oni rakontis, ke li estas kantisto, estis pli pecigita kaj pli disŝirita kaj pli ĉifonita ol iam ajn antaŭe.

Kaj la ino diris: „Sciu, amiko mia, se bufoj kun sataj buŝoj proksimiĝas al mi kun sia veneno; se ratoj vostohavaj kiel maliculinoj ĉirkaŭsvarmas mian liton kaj volas ŝiri min el mia reĝa burgo, eksteren en la frostan nokton de nudaj muroj; se vermoj volviĝantaj kiel pastraj fingroj alrampas kaj disvastigas nedireblan naŭzon kaj fetorantan peston kaj volas kovri min kaj mian spiron per ĉiuj mensogoj kaj

malbelaĵoj de tiu ĉi ŝtipkapula mondo, jen mi pensas ĉiam nur pri vi, Kundar, amiko mia; kaj vidu, jen fariĝas ĉiutempe pli hele ĉirkaŭ mi kaj ĝojige kaj ridantaj sunoj staras super mi, mi aŭskultas la kantadon de la birdoj en la arbaro, perceptas la susuradon kaj flustradon de la herboj. La kantado de la fontoj aŭdeblas ĝis miaj oreloj kaj mi sentas la odoron kaj la kolorojn de la floroj kaj la venenaj bufoj fariĝas paradizbirdoj, la ratoj fidemaj kapreoloj kaj la minacantaj nudaj muroj blanka marmoro pripendata per tapiŝoj el Orientlando.“

Kaj Kundar silentis.

Sed post iom da tempo li diris: „Ĉu vi ne tranĉis kun sangantaj larmoj infaneton el via koro?“

Kaj la ino diris: „Mi faris, amiko mia, jes ja! Ĉu mi povis fari ion alian, kaptita inter ronĝantaj kaj fosadantaj musoj, kies okulojn dolorigas la lumo? Ĉu mi ne devis fari tion, malproksime de homoj? Ĉu vi volas vidi ĝin, mian sangantan koron, Kundar, amiko mia? Al vi mi volas montri ĝin, sole al vi mian sangantan koron, kiun neniu vidis kaj pri

kiu aŭdis neniun. Al vi mi volas montri ĝin, amiko mia, por ke vi sciu, kiel vundita la kroneto estas kaj ties servistino.“

Sed Kunder skuis la kapon kaj diris: „Mi vidis ĝin, vian sangantan koron; maljuna saĝulo kun profundaj okuloj nemorteblaj kiel la eterna nokto etendis bonvoleman manon al mi, kaj sur lia mano kuŝis via sanganta konvulsia koro. Kaj ĝi banis sin en larmoj, en varmegaj larmoj, kiuj superfluis el la kavigita mano de l' saĝulo. Ho, mi opinias, ke ĝi estis la spirito de viaj patroj, la unua semograjno, el kiu vi ŝosis. Sed miaj pensoj migras tra foraj mondoj, iras tra pasintaj eternecoj kaj iras tra estontecaj eternecoj kaj mi staras enmeze de tio. Ho, animo, animo mia, kiom multe vi serĉas? Ĉu vi serĉas la duan animon por esti perfekta universe kaj eternece? Ne krii! Elaĉeto okazu al vi! Malfermu koron kaj animon!“

Jen diris la ino: „Ĉu vi aŭdas, amiko mia, kian mirindan kanton kantas la fonto? Pri eterneco! De eterneco! Ne krii, animo, mia animo soifanta!“

Jen diris Kunder: „Mi volas porti vin, por ke viaj vunditaj

piedoj jubilu kvazaŭ ili irus sur roso kaj sur delikata
mosko.“

Kaj li levis kaj forportis ŝin.

Kaj ili venis al ĉarma kastelo. Tiu estis konstruita el blanka marmoro kaj la tegmentoj estis el oro kaj la kreneloj el pura arĝento kaj la buntaj rondaj fenestrovitretoj estis rubenoj, topasoj kaj turmalinoj, spineloj, krizolitoj, turkisoj kaj ametistoj. La sojloj estis el ebono inkrustitaj per nebrila arĝento, la pordoj el ligno de Libano kaj iliaj randaj kovriloj el veterbatita kupro. Kaj la lampoj, kiuj staris antaŭ la kastelo, portis kiel lumilojn grandajn diamantojn kaj akvomarinojn enfiksitajn kun blanka plateno. Kaj malantaŭ la kastelo estis lago. Tiu havis tute helan kaj klaran akvon. Oni povis rigardi ĝis la plej profunda fundo, kie la marfeinoj ludas.

Kaj la ino diris: „Ĉu vi vidas tiun kastelon, Kundar?“

Kaj li respondis: „Mi vidas ĝin!“

Jen diris la ino: „Vi vidas ĝin, do vi ĉiam trovos ĝin, mia amiko Kundar. Neniu scias pri tiu kastelo. Neniu trovos ĝin. Ĝi kuŝas malproksime malaperinta en la profundo de la nekonata fora arbaro. Kundar, amiko mia, mi volas atendi vin, ĉi tie je la pordo de tiu burgo; mi volas atendi vin, se

Novluno komenciĝos. Ĉu vi venos, Kundar, amiko mia?”

Kaj li respondis: „Mi venos!”

Jen diris la ino: „Venu! Do atentu, mia koro soifas pri nokto, en kiu mi sentos mian animon konservatan en la majesta kvieto kaj eterna beleco de la neatingebla, pri nokto, en kiu mia animo fariĝos sankta en la perdado kaj malfermata estos lumado, en kiu speguliĝos la kosmo, en kiu nia spirito kaj nia volo estos grajneto de la semo de Dio. Vi scias, kion mi diras, ĉu? Kial metis la dia estaĵo tiom da timo en nian animon? Timo pro la laŭta kriadado, timo pro la malsanktigo, timo pro nudiĝo, timo pro la rozvualo de nia vizaĝa aspekto. Solvu tiun demandon al mi, amiko mia! Mi estas via kaj estos via en eterneco. Tial!”

Kaj li levis ŝin de la puto kaj forportis ŝin multajn horojn, ĝis ili venis al la lastaj arboj de la arbaro, kiuj estis ankaŭ la unuaj.

Kaj en la foro antaŭ ili troviĝis la urbo, bone nutrata kaj laŭorde ekipata kaj kun sataj burĝoj.

Kaj alte super la urbo tronis la reĝa burgo.

Kaj kiam Kundar jam metis la inon surteren en la verdan herbejon kaj molan moskon, kiujn li alportis por apogi ŝin ripozige, Kundar foriris.

Kaj la ino vidis kiel li malaperas en la foro en la nebulo kaj fine estis tiel levita alten, ke li foriĝis el ŝia rigardo.

Jen prenis la ino malgrandan arĝentan kornon, kiun ŝi portis per ora ĉeneto ĉirkaŭ la kokso kaj blovis en ĝin.

Tio estigis helan, vokantan sonon.

Kaj tre baldaŭ alvenis rapide la servistoj.

Kaj la marŝalo diris: „Ĉu vi estis sola en tiu terura arbaro, ino nobla?“

Jen ŝi diris: „Mi ne estis sola!“

Pri tio ĉiuj miris tre.

Kaj la reĝino vokis: „Konduku mian ĉevalon al mi, por ke ni

ekiru!“

Kiel tre gracile rondigita linio staris Luno en la ĉielo. Jen fajna minca delikate pentrita brila arko. En la malhela nokto ĝi aspektis kiel ŝvebanta revata kronringo, kiu tie atendas, por ke iu paŝu sub ĝin, por ke ĝi sinku sur lian kapon, por ke ĉiuj homoj voku: „Rigardu, reĝo estas naskita al ni! Ni iru por levi lin sur la ŝildon kaj por porti lin en nian urbon kaj proklami lin ĉie kaj ĉiuvoje: „Ĉiu sufero de la mondo estas prenita de ni, surgenuiĝu kaj kisu la teron, kiu naskis vin kaj kiu nutras vin, ĉar la homo aperis kaj volas esti inter ni!“

Kaj Kundar paŝis sub la altaj sveltaj kolonoj, sub la arboj, kiuj elstaris en la ĉielan volbon, en la profundon de la arbaro.

Kaj liaj paŝoj sonis tra la tenebro de la nokto kiel heroldaj fanfaroj en granda malproksimeco. La nimfoj prilumis lian vojon, por ke li ne falu kaj ne eraru pri la vojo. Kaj se li iris trans senarban herbejon, jen nebulinoj vagadis ludante rondodancon apud li kaj sur montetoj kaj ĉe deklivoj dancis elfinoj.

Por li estis mallaŭta kantado en la aero kaj karesemaj

sonoriloj sonoris.

Kaj Kunder enpensiĝis pri la stranga kastelo.

Kaj jen antaŭ liaj okuloj staris la kastelo ĉirkaŭbrilata kvazaŭ de mil sunoj, kaj la lanternoj ĵetis longan fulmantan lumon sur lian vojon, alkondukis lin kaj poste retiris siajn brilajn lancojn kun la pordegaj flugiloj kastelen al si, tiel, ke la arbaro denove troviĝis en tenebro kaj la elfinoj saltante troitis hejmen.

Kaj la ino staris apogite al la pordo el ligno de Libano.

Kaj Kunder vidis nenion krom ŝiajn lumantajn okulojn, kiuj ĉirkaŭprenis lin kaj vualis en beatecon.

Kaj Kunder sinkis antaŭ ŝi sur la genuojn kaj klinis sian kapon sur unu el ŝiaj manoj.

Sed ŝi kisis lin delikate sur la hararon, levis lin supren kaj kondukis lin internen.

Kaj la pordo fermiĝis malantaŭ ili kaj vokis kun obtuza tono: „Fermite!“

Kaj Kunder akompanis ŝin ĉemane al ŝia ĉambro.

Jen prenis la ino martelon kaj frapis sonorilon, kiu grande kaj peze pendis en la halo.

Kaj la sonorilo estigis profundan sonoritan sonon kaj vokis:

„Finis dorm’! Pasis ĝi.

Al mi! Al mi! Al mi!

Finis dorm’. Pasis nun!

Bum! Bum! Bum!”

Kaj kiam la voko de l’ sonorilo estis eltintinta, ĝi komencis flustreti kaj flustri, susuri kaj murmuri, kuregi kaj spiregi, kuri el ĉiuj pordoj kaj pordegoj, trans ĉiujn ŝtupojn kaj ŝtuparojn, tra ĉiuj irejoj kaj haloj kaj salonoj kaj arkoj, en ĉiuj ŝrankoj kaj kestegoj, en ĉiuj relikvaj sanktejoj kaj kestoj, sur kusenoj kaj seĝoj, en kuirejoj kaj keloj, en subtegmento kaj tenejoj, sur plankoj kaj plafonoj, en anguloj kaj anguletoj, en kamenoj kaj kamentuboj kaj dekstre kaj maldekstre kaj antaŭe kaj malantaŭe, kaj supre kaj malsupre paŝetis kaj trotetis, ŝoviĝis kaj teksigis, subridetis kaj odoretis. Jen vigla vivo en la kastelo komenciĝis. Kantis kaj sonis, kaj jubilis kaj trilis.

Jen rigardu: la kruĉoj starantaj sur la kornicoj fariĝis ĉambristoj svarmantaj kaj tumultantaj kun blazonornamitaj vestoj kaj kun larĝaj arĝentaj butonoj; kaj la taburetoj starantaj en la anguloj kaj niĉoj fariĝis gracilaj ĉambristinoj kun facilaj antaŭtuko en buntaj roboj, kaj ili babilis kaj paroletis kaj komencis moviĝi en kestojn kaj ŝrankoj; kaj la delikataj kalikoj starantaj sur la kamenoj kaj plenigitaj per floroj, fariĝis plej amindaj lindaj ĉambristinetoj, kiuj vigle saltis de siaj lokoj kaj bone instruite riverencetis antaŭ la ino kaj ĉiuj diris: „Kion Via Moŝto degnas plejbonkore ordoni?“ Kaj la sveltaj alte etendiĝantaj kandelingoj el stano kaj porcelano fariĝis paĝioj, kiuj per giganta salto ekstaris meze de la halo kaj faris profundan riverencon antaŭ la ino, ili ruĝiĝis kaj timeme diris: „Via Moŝto, laŭ via ordono!“ Kaj tiuj, kiuj antaŭe estis el arĝento, havis arĝentajn kunŝnuraĵojn. Tiuj, kiuj estis el porcelano, havis ruĝajn, blankajn, verdajn kaj bluajn kamizolojn, kaj tiuj, kiuj kreskis el stano, havis ledajn uniformojn kaj longajn ledajn botojn. Kaj ili portis falkistoringojn kaj diris aŭdace: Ino nobla, kiam vi rajdos al la falkoĉaso de l' aredoj!

Kaj la ino diris: „Ni banu nin, por ke eĉ ne spireto de la

kriado de l' mondo ripozu sur niaj korpoj. Nenio de tio, kio estis ĉirkaŭ ni en frostaj tagoj, ŝteliĝu en niajn revojn, trudiĝu en niajn pensojn kaj plenigu nin per veaj doloroj!“

Kaj la banejoj estis admirindaj florĝardenoj, kaj enmeze de ili troviĝis profunde enmetita lageto ĉirkaŭata de neĝe blanka marmoro. Kaj ĉirkaŭe staris leonoj el pura oro kaj el iliaj ruĝaj buŝoj ŝprucis larĝstrie bone odoranta akvo.

Kaj ĉie estis ora helo kaj neniuj kapablis diri, de kiam ĝi ĉeestis.

Jen alkuris nigraj knaboj kaj ili ŝmiris la blankajn korpojn de la banantoj per mirindaj kremo, kiuj donis bonfartigan frideton kaj forprenis ĉiun lacecon.

Kaj violonoj kaj flutoj sonadis kaj de iu malproksimo sonadis dolĉaj infanĥoroj.

Kaj tiam ili iris al la manĝo.

Tiel pasis tri tagoj. Kaj estis ĉasado, muziko kaj danco. Kaj ĉiu tago alportis novajn sennombreblajn ĝojojn.

Sed jena estis la plej belaj el ĉiuj: la aŭreolvestita ino kuŝis sur alten tavoligitaj matoj kaj molaj tapiŝoj kaj diris: „Kundar, amiko mia, parolu kaj mi aŭskultos. Parolu al mi pri saĝo kaj vero kaj pri amo! Parolu al mi pri la ĉielo, pri la steloj, pri malnovaj tempoj kaj pri amo! Kantu viajn dolĉajn kantojn kaj kantu pri amo kaj mi aŭskultos! Rakontu al mi viajn plej ravajn fabelojn pri homoj, pri bestoj, pri floroj, pri ĉiuj aĵoj kaj pri amo! Kaj mi aŭskultos! Kantu al mi pri Suno, pri la brila lumo kaj pri la multspeca vivo kaj pri amo! Kaj mi aŭskultos! Kaj se mi ridos kaj se mi ploros kaj se mi revos, tio tute ne afliktu vin; ĉar mi, komprenu, ridas por vi, ploras por vi, revas por vi kaj mortas por vi!“

Kaj Kundar faris tiel!

Kaj ŝi fariĝis neniam laca.

Kaj tiel estis ankaŭ post tri tagoj vespere. Kaj certe en la nokto.

La ino kuŝis trankvile kaj aŭskultis lin. Kaj ŝi ridis kaj ploris kaj revis kaj ŝia animo ondadis supren kaj malsupren en arda ĝojo. Kaj ŝi rigardis lin kaj diris: „Brakumu min,

Kundar, amiko mia! Plenumu mian koron kaj mian animon per vi, por ke mi finu esti mi mem. Majeste kaj en dolĉa profunda frandeco. Kaj mi volas rekomendi min al vi, tute kun pura vera ĝojo, mi volas esti via, tute sindonema kaj pacienca. Kaj mi ne volas amarsi en mia koro kaj mi volas danki al vi ĝis la lasta horo de la forfluanta eterneco. Kaj mi volas kisi vian buŝon, kiu je la unua fojo nomis min ino, mi volas kisi viajn okulojn, en kiuj mi retrovis min mem, mi volas karesi viajn vangojn; kaj viajn manojn kaj vian kapon mi volas premi al mia brusto, por ke vi sentu kaj aŭskultu mian koron kaj por ke vi sciu, kiun celas la frapado de mia koro!“

Kaj ĉar li ne diris ion, ŝi turnis sin al li.

Kaj li staris antaŭ ŝi. Kaj liaj okuloj estis deturnitaj de ĉio, kio ligis lin al la tero, pensante ankaŭ pri la elaĉeto de la homo, kiu estas naskata el la koro kaj for de la svarmado de l' mondo.

Kaj ĉar ili do vidis lin, ŝi vokis kun jubila voĉo: „Mi ja nun estas la plej feliĉa el ĉiuj inoj, Kundar, amiko mia, nun, ĉar

mi konas vin kaj nun, kiam mi vin scias! Estas plenumite!
Ĉio! Venu al mi, brakumu min kaj kisu min; ĉar de nun mi
estas libera. Do prenu min kaj portu min al la altoj kaj
abismoj. Mia serĉado estas kontentigita, miaj piedoj ne plu
sangas jam dum tri tagoj. Venu al mi, mia plej kora amiko!“

Kaj ŝi disvastigis siajn brakojn por akcepti lin.

Kaj li proksimiĝis paŝante kaj ŝi metis siajn brakojn ĉirkaŭ
lian kolon kaj tiris lian kapon ĝis proksime al si. Kaj ŝi
premis liajn lipojn sur sian buŝon.

Kaj kiam ŝi sentis arde lian respondan tuŝon, ŝi diris
mallaŭte: „Vi, mia plej kora amiko!“

Kaj ŝi klinis sian kapon iom malantaŭen por serĉi liajn
okulojn.

Jen li malfermis siajn okulojn, kaj jen, vidu: La ino estis
morta!

Kaj li sinkis antaŭ ŝi sur la genuojn kaj preĝis.

Kaj li do parolis:

„Vi dormas, aŭreolornamita ino!

Sanon al via sanktigita dormo!

Atentu: Mi dormkantis al vi,

kaj nun vi glitas

sur la ŝanceliĝantaj pontoj de la eterna revo.

Transen en la kampojn de la lumsvingigitoj!

Kaj vi revenos en spira ondo.

Aŭ en la spiro de kolorjubilanta floro.

Aŭ en la flagrado de lumo

aŭ en la plendantaj sonoj de la vento.

Aŭ en perdita flustrovoĉeto

elsaltinta el la ondofrapado de l' maro.

Aŭ en la rapidanta plaŭdado de l' rojo.

Aŭ en la flugilbato de birdeto.

Aŭ en la brila radio de stelo.

Aŭ en la unua rideto de novnaskita bebo.

Aŭ en la unua kanto de amanto.

Aŭ en la riĉaj pensoj de saĝa viro.

Kaj atentu: kiel bone, ke vi dormas, multnobla ino,

kiun mi amis!

La plej alta beateco okazas ja nur tiukaze,

se la longa dormo forprenas de ŝi

la malfreŝajn kaj ŝimantajn restaĵojn

de bongustega festmanĝo.

Atentu do: kun ŝimo, kun velkaj rozoj

kaj kun dumaniere interpretitaj rigardoj

transvivi la matenon, aŭreolvestita ino:

Tio estas la malbeno de l' mondo, kiu korpremas nin.

Tio estas la malbeno, kiu ŝarĝas

la lastan sonon de feliĉa horo.

Tio estas la malbeno, kiu estas metita

sur la salte ekfloranta burĝono!

Benata vi estas, plej beata el ĉiuj inoj,

ĉar vi ne vidis tiun matenon kaj tiun ŝimon

kaj ne vekiĝis kun malfermege demandantaj

okuloj.

Sub renversitaj temploj

kaj apud detruitaj bildoj kaj

frakasitaj kolonoj de dioj!

Benata vi estas, aŭreolvestita ino,

*ĉar granda kompatulo de l' kosmo
vin metis en la eternan beatecon
kun softa transŝvebado al tiu foro!
Sciu do: la plej granda kaj plej beniga
el la ĝojoj
jubilas plej alte dum ununura sekundo
antaŭ la sonorilbato,
kiu promesas al vi beatecon!
Tial pluan fojon benata estas vi, graciaĝa ino,
ĉar via regno kaj viaj limoj
estas nun bazitaj kaj fere metitaj
dum eterneco!
Benata vi estas, aŭreolvestita ino,
pro via perfekteco
esperon promesanta!“*

Kaj kiam Kunder estis dirinta tion, li kisis ŝiajn okulojn.

Kaj la okuloj estingiĝis kaj fermiĝis.

Kaj granda delikate blua papilio flugis kun fridetiga
svingado sur ŝin kaj tuŝis ŝian vizaĝon kaj postlasis tie

superban fajnan bluan brileton.

Kaj Kundar metis ŝiajn manojn unu sur la alian kaj diris:
„Por ke via karesema fratino, la dekstra mano, eterne ne
angoru pro la maldekstra!“

Kaj baldaŭ li levis la noblan inon, banis ŝin per bongustega
vino kaj enbalzamigis ŝin per hinduja narda oleo kaj aliaj
bonodoraj ungventoj, por ke ŝia korpo ne disfalu en polvon
kaj osterojn.

Kaj li volvis ŝin en silkajn vualojn kaj en tukojn de l' Gango
kaj metis ŝian kadavron en bronzan keston profunde en
ŝarĝon de ruĝaj rozoj.

Kaj li portis ĝin malsupren en la arbaron kaj enfosis ĝin sub
kverko kaj konstrue metis altajn ŝtonojn ĉirkaŭ la bronza
kesto, por ke la bestoj ne havu aliron.

Kaj li kovris ĝin per tero.

Sed li ne metis ŝtonon sur la teron kaj diris: „Por ke via eta
mamo ne estu dispremita kaj via koro ne ĝemu!“

Kaj kiam li estis farinta ĉion ĉi, baldaŭ floris ruĝaj rozoj sur ŝia tombo kaj blankaj lilioj kaj hiacintoj disipantaj kolorojn.

Sed la aro ĉirkaŭstaris kun flamantaj torĉoj kaj silentis.

Sed dolĉe vee plendantaj knabaj ĥoroj kantis de la balkono.

Kaj Kunder eniris.

Kaj li banis sin kaj diris: „Por ke neniu resteto de ŝia rigardo eliru kun mi en la mondon, kie la satuloj paŝtiĝas kun laŭtaj kaj malicaj sencoj.“

Kaj li tuŝis siajn pompajn kavalierajn vestojn, kiuj ekestis, kiam li eliris la unuan fojon el la banejo. Kaj ĉar li tuŝis ilin kaj diris: „Por ke vidu ilin neniu, sur kiujn rigardis ŝiaj okuloj kaj kuŝis manoj ŝiaj“, kaj jen denove aperis liaj iamaj vestoj disŝiritaj, dispecetigitaj kaj ĉifonitaj. Kaj pri tio li ĝojis elkore.

Kaj li iris al la sonorilo, kiu pendis en la halo.

Kaj ĝia sonoro resonis.

Kaj la sonorilo vokis:

„Maldormtemp', ĝojotemp', vivotemp', glora temp'.

Jen: Nun! Nun! Nun!

Dormotemp'! Dormotemp'! Dormotemp'!

Bum! Bum! Bum!“

Kaj kiam la voko jam elsonis, jen staris sur kornicoj kaj kamenoj kruĉoj kaj kandelingoj, kaj en la anguloj kaj niĉoj staris velure ornamitaj taburetoj tre antikvaj .

Kaj li eliris.

Kaj la pordo post li klake fermiĝis kaj vokis: „Fermite!“

Kaj li tiris la ŝlosilon el la seruro, iris al la klara lago kaj levis el ĝi fragmitan tigon, pendigis la etan oran ŝlosilon al la radiko de la tigo kaj sinkigis ĝin.

Kaj la tigo ŝanceliĝis en la vento kaj kapjesis al li: „Bone konservite! Bone konservite!“

Kaj Kunder levis siajn okulojn kaj vidu:

Jen leviĝis Suno.

Kaj la seruro jam foriĝis kaj profunda lago kun miloj da etaj rondaj verdaj folietoj kuŝis meze de la profunda arbaro.

Kaj Kunder paŝis tra la arbaro. Kaj tie li venis al la lastaj arboj, kiuj estas ankaŭ la unuaj. Sed vidu! Jen multe da popolo proksimiĝis renkonte al li.

Ili serĉis sub ŝtonoj kaj arboj, en florokalikoj kaj ĉe herbotigoj, sur musko kaj sub plugitaj terosulkoj.

Kaj li demandis: „Kiun vi serĉas?“

Kaj ili respondis: „Ni serĉas nian malgrandan ĉarman reĝinon!“

Kaj li demandis: „Kial?“

Kaj ili cirkle enfermis lin, rigardis al li, montrosignis al li kaj skuis la kapojn.

Kaj ili parolis ankoraŭfoje kordisŝire plendante: „Ni serĉas nian junan, malgrandan, ĉarman reĝinon jam dum dek tagoj!“

Kaj ili tre ploris.

Sed post pluaj dek tagoj, la onidiro estis disvastigita:

„Sovaĝa urso disŝiris ŝin en la arbaro!“

Kaj denove post dek tagoj leviĝis alia onidiro: „Ŝi ripozas en profunda dormo en monto!“

Kaj jen denove post dek tagoj diris la popolo: „Ŝi kuŝas en profunda lago!“

Kaj jen oni deklaris en la tuta lando: „La juna reĝino estas morta, ŝi mortis dum la naskaj doloroj!“

Kaj tra la tuta lando sonoris la sonoriloj kaj oni malhisis la flagojn kaj nigraj flagorubandoj flirtadis.

Sed la popolo ne akceptis tion kaj fariĝis plena de sankta sopiro kaj diris: „Elaĉeto! Elaĉeto! Elaĉeto! Ni atendas vin!“

Kaj la marŝalo havis la kortegan kuraciston subbrake, tenis lin tra ĉiuj stratetoj kaj diris sen interrompo: „Nu, ĉu mi ne diris tion ĉiam! Jen la rezulto! Sed neniuj atentis miajn vortojn.“

Kaj kiam ankoraŭfoje pasis luno, la popolo fidis al nenio plu. Kaj ĝi estis plena de duboj kaj demandoj kaj turmentoj. Kaj

ĝi disvastiĝis sur la tuta Tero por serĉi sian junan reĝinon.

Elmigris viroj, inoj kaj infanoj.

La oldulojn, la malsanegulojn, la malsanulojn kaj la
gravedulinojn kaj ĉiujn, por kiuj la vojo estis tro streĉa, kiuj
kuŝis en profunda dormo, mortigis la kompatemaj homoj
kaj enfosis ilin.

Kaj kien ajn ili venis, ili ĉiuj demandis: „Ĉu vi vidis nian
junan reĝidinon?”

Kaj tiel ili faris tion ĉiuloke kaj ĉe ĉiu migranto.

Sed oni mokis kaj kaj ridis pri ili.

Kaj tial ili vagis senorde for.

Kaj la floranta lando fariĝis dezerta kaj malplena kaj ĝia
elspiro ŝtonigis ĉiun, kiu venis en ties proksimecon.

Kaj Kundar staris malproksime kaj rigardis la urbon denove
en la lumo de la subiranta suno.

Sed la urbo, iam tiom bone nutrata kaj tiel bone armita kaj loĝata de satuloj kaj de trankviluloj ŝrumpis kaj estis fine kiel kampo kun ŝtonoj.

Kaj supre super la urbo elstaris la reĝa burgo. Kaj iliaj fenestroj kaj kreneloj briletis kaj ardis ruĝe.

Kaj Kunder pensis pri la reĝa burgo kaj ĉiuj ĉambroj, en kiuj ili vivis.

Kaj li levis sian voĉon kaj parolis: „Sankta estas la sojlo super kiu viaj piedoj paŝis! Sankta estas la kurteno, kiun via mano tuŝis! Sankta estas la kuseno, sur kiu via kapo kuŝis!“

Kaj la burgo diseriĝis kaj disrompiĝis.

Kaj li diris: „Ŝtonoj ili denove estos, de kiuj ili estis prenitaj. Sed ŝtonoj parolos, kie la koroj de la homoj sangas! Savo okazos al la homoj per larmoj kaj multe da doloroj kaj multe da korsuferoj! Savo okazos per demandoj kaj serĉado kaj migrado! Ek do, ni iru vojeraren, kie sola estas la vero, la saĝo, la savo kaj la vivo.

Kaj kiam li do estis parolinta tion, li foriris en foran landon ankoraŭ je la sama vespero.

F I N O